

La **Jubilea**
50 JAROJ
WIZENBERG
XXIX UNIVERSALA KONGRESO DE ESPERANTO

Varsovio, majo 1937

Nr. 5.

ENHAVO:

Antoni Grabowski — Saiuto el Varsovio.

Tiberio Morariu — Jubileaj pensoj.

Jakób Šapiro — Kie naskigis la Majstro.

Id — Pri la programo kaj karaktero de nia Jubilea.

Programo de la Kongreso.

El la kongresa urbo.

Komunikoj de LKK.

Listo de kongresanoj.



Antoni Grabowski.
Pioniro de esperanta poezio.

SALUTO EL VARSOVIO

Samideanoj, akceptu vi
Korajn salutojn el Varsovi'!

Akceptu ilin, tra l'tuta mond'
Disportu ĉien al nia rond'.

Diru, ke ankaŭ sur pola ter'
Batas la koroj por sankt-esper'.

Leviĝos fine la ora sun',
Kie nur steloj flagretas nun.

Ektondros laŭte triumfa kant',
Pri fina venko de l'esperant'.

Do mi nur preĝas: Ho, donu Di',
Ke ĝin ekaŭdu ankoraŭ mi!

Antoni Grabowski
(„El parnaso de popoloj“).

Ke ankaŭ tie, apud Vistul',
Renkonte brilas amik-okul',

Kaj etendiĝas fidela man',
Sonas: „Bonvenu, samidean'!“

Kvankam la nokto ĉirkaŭas nin,
Ni kredas: Tago brilos en fin',

JUBILEAJ PENSOJ

Dudek jaroj pasis post la morto de Doktoro Zamenhof. Kvindek jaroj pasis post la apero de nia Esperanto. La verko postvivis sian kreinton. Jen la unua grava signo pri la vivpovo de nia lingvo.

Eliru sur la straton kaj haltigu dek homojn hazarde elektitajn. Aŭ pli ĝuste sen elekto: junulon kaj maljunulon, laboriston kaj intelektulon, ŝoforon aŭ studenton. Demandu ilin, kio estas Esperanto. Verŝajne almenaŭ kvin el ili, eble eĉ pli, ne diros ke Esperanto estas iuspeca cigaredo, sapo aŭ lipruĝigilo, sed mondlingvo. Fakte oni jam konstatis, ke multe pli da homoj konas la nomon de nia interpopola komprenilo, Esperanto, ol entute scias ion ajn pri la ideo de artefaritaj lingvoj. Eble eĉ ne ĉiuj esperantistoj scias, ke ekzistas (aŭ ekzistis) kelkaj centoj da projektoj pri artefaritaj lingvoj. Projektoj, planoj, intencoj, provoj. Sed Esperanto, kunmetita el aliaj vivantaj lingvoj, sole vivas hodiaŭ. Centmiloj korespondas en ĝi. Uzas ĉe vojaĝoj, en komerco, dum kongresoj. Ekkonas per ĝi aliajn popolojn. Lernas, interamikiĝas, amas, ĝojas, ploras, kantas: v i v a s en ĝi.

Speco de moderna sporto estas „orientiĝa promeno“. La partoprenantoj de tiu aranĝo ne kuras rekte antaŭen, nek vagas blinde laŭ bontrovo. Ili haltas sufiĉe ofte por orientiĝi jen laŭ suno aŭ stelaro, jen laŭ kompasoj. Eble nur por ripozoj momenton kaj kolekti novan forton. Rerigardi faritan vojon, aŭ mezuri restan parton. Ankaŭ ni, verdstelaj lingvoturistoj, haltu iom ĉe la sojlo de nia duonjarcenta jubileo. Kaj demandu kion ni atingis.

Ni faru sobran kalkulon. Konstatu, ke ni ne atingis ĉion. Povas esti, ke eĉ ne la duonon de definitiva venko. Sed ne falu en malesperan pesimismon. Ne asertu, ke ni atingis nenion. Ĉar ni efektive povas fieri pri gravaj sukcesoj. En kadro de mallonga artikolo estas maleble menciigi eĉ nur plej gravajn akirojn. Tial ni provu ĵeti memorigan lumon nur sur kelkajn faktojn:

Dum la mondmilito nia lingvo faris gravajn servojn al la Internacia Ruga Kruco, kiam la Centra Oficejo de la Universala Esperanto-Asocio en Genevo peradis leterojn de hejmanoj el diversaj landoj al malfeliĉaj militkaptitoj kaj de ĉi lastaj al hejmanoj. Kortuŝajn, korskuajn interligojn faris nia amilingvo retrovinte amatojn perditajn, pri kiuj oni eĉ kredis, ke ili estas mortaj.

Post la milito la popoloj iĝis sentemaj mimozoj. Ĉiu timis sian najbaron. Neniu volis unue etendi sian manon por politika paco. Sed diktis ekonomia neceso. Unu post la alia malfermiĝis internaciaj foiroj. Kostegis multlingva reklamo. Moderna reformemulo raciigas, ŝparas. Aplikas Esperanton. Nuntempe apenaŭ oni povas imagi modernan foiron, ĉu en Parizo aŭ Lyon, Budapeŝto aŭ Prago, kie oni ne utiligus Esperanton. Esperanta Turista Komisiono havigis milon da estonaj vizitantoj al stokholma foiro.

Francoj ŝatas vizitojn de italaj kaj germanaj turistoj. Sed pro komprenebla, senta kaŭzo ili ne ŝatas anoncadi en nomitaj lingvoj. Cetere angloj, hispanoj samrajte postulus ĉion en sia lingvo. Kiu povus pagi tiom la diverslingvaj elkriboj por substreki neglekton de pola aŭ norvega



Memortabulo honore al Antoni Grabowski sur la domo ĉe str. Hoża 42.

„Foto-Prasa“.

turisto. Jen kolumba solvo: trafikfostoj en suda Francujo anoncas „Halton por aŭtobusoj“ kaj „Nepermesitan direkton“ — krom franca — en Esperanto. Simile la klarigoj en la Norda Stacio de Parizo. Kaj esperantaj informoj en franca horaro de pariza „Metro“ (subtera fervojo). Esperanto sur telefon-aŭtomatoj kaj ĉe poŝtigetoj en turistregno Nederlanda. Esperantaj ŝildoj ĉe centoj da ĉeĥoslovakaj stacidomoj. El fama Brno dramo, opereto, tuta opero venas al ni en Esperanto. Kaj ni ne plu sidas kiel surdmultuloj aŭdante radioprogramon el Estonio, Svedlando aŭ Italio. Klariga teksto sur poŝtkartoj kaj poŝtmarkoj de Aŭstrio, Brazilo, Hungarujo, Liĥtenŝtajn, Ruslando estas en Esperanto. Ne propagandistaj esperantokluboj presis ilin, sed mem la poŝtdirekcioj de respektivaj ŝtatoj. Japanaj scienculoj preferas eldoni siajn verkojn en neŭtrala Esperanto, anstataŭ politikporta angla.

Nun ni vivas en la Jubilea Jaro. Ĉiu samideano laŭ sia povo devas kontribui al nia granda festo. Per aĉeto kaj lego de nova esperanta libro. Per abono al niaj gazetoj. Faru elementan aŭ superan ekzamenon, se vi sentas kapablon; eĉ instruistan ekzamenon. Enpagu la tutjaran klubkotizon,

En tiu ĉi domo
logis
Inĝ. Antoni Grabowski
senlaca pioniro
de la ideo de la lingvo internacia
genia tradukinto
de „Sinjoro Tadeo“
kaj de aliaj ĉefverkoj de pola literaturo en
Esperanton.

VI Tutpola Kongreso de Esperantistoj
Warszawa, 5.VI.1933 j.

aktive kunhelpu ĉe la kluba programo. Varbu novan amikon al Esperanto. Kaj

PILGRIMU AL POLLANDO

kie balancigis la lulilo kaj kie en trankvilo ripozas la korpo de nia Majstro. Lia nobla koro, kiu gis la lasta momento de sia vivo frapis ame-zorge por aliaj.

En mia nova hejmlando sveda estas bela kutimo, ke fine de aprilo oni forbruligas malnovaĵojn, sekajn branĉojn por despli pure akcepti floroportan, varmovokan majon. Ankaŭ ni, esperantistoj, ĵetu nun ĉiujn sentojn de persona malamo, privata intereso aŭ ambicio en la grandan festfajron de nia Jubilea Kongreso. Kun novaj, refreŝigitaj koroj, unuigitaj fortoj komencu novan laborepokon, kiu alkondukos nin al la definitiva venko de nia interpopola amlingvo Esperanto.

Aŭskultu la vekan vokon de nia laborema L. K. K.:

VENU AL VARSOVIO!

Tiberio Morariu.

LASTMINUTA SCIIGO: Julio Baghy alvenis Varsovion por gvidi kursojn laŭ Cseh-metodo. Multaj kursaligoj!

KIE NASKIĜIS LA MAJSTRO

Ĉu ekzistas urbo, pli konata en la tuta mondo, ol Białystok?

Certe ne. Ni povas tion diri sen ia-ajn fanfaronado.

Neniu mondurbo, neniu ĉefurbo estas konata ĉie, en la tuta mondo. La homoj ĝenerale ne havas tro precizajn konojn de geografio. Oni ofte eraras pri ŝtataparteneco. Eĉ al gravaj sciencaj organizaĵoj iam okazas, ke ili adresas leteron al ia loko kaj indikas neĝuste la landon, kio kaŭzas iafoje indignon, alifoje nur ridon.

Sed Białystok estas konata ĉie, en ĉiuj kvin mondpartoj, eĉ en plej etaj lokoj. Ĉie, kien trapenetris la mirinda verko de la modesta Zamenhof.

Ĉiu Esperantisto legis pri tiu urbo, ĉu en biografio de la Majstro, ĉu en lia famekonata letero pri la deveno de Esperanto, aŭ en la bela ĉapitro „La infano en Bjalistok“ de la bonega verko de Edmond Privat „La vivo de Zamenhof“.

Certe la deziro de ĉiu Esperantisto estas viziti tiun urbon, kie naskiĝis la Majstro, kie li pasigis siajn unuajn jarojn de la infaneco, kie unuafoje aperis al li — eble en ĝenerala kaj nebula formo — la ideo pri tio, kio poste fariĝis celo de lia tuta vivo.

Jam multaj gesamideanoj vizitis unuope Białystok, kuŝanta sur la granda fervojo Parizo-Moskvo. La fervoja krucstacio Białystok kvazaŭ ligas Orienton kun Okcidento. Ankoraŭ unu simbolo, da kiuj ne mankas en Białystok.

Ĉar efektive Białystok ne estas okaza naskoloko de Zamenhof. Finfine ĉio en la mondo havas sian profundan kaŭzon kaj ĉiu historia fakto estas sekvo de multaj cirkonstancoj kaj kaŭzoj, kvankam ofte ŝajnas al ni unuavide, ke tiun fakton kaŭzis simpla okazo.

Zamenhof mem ja rakontas en sia letero al Borovko, ke la kunvivado de kvar diversaj nacioj en lia naskurbo kaj reciproka malkompreno donis al li la unuan puŝon pripensi rimedon por forigi la intergentan malamon kaj por ebligi reciprokan interkompreniĝon. Jarcentoj pasadis, dum kiuj Białystokanoj sopiris al paca interkompreniĝo, ĝis tiu ĝenerala aspiro enkorpigis en la juna Ludoviko, kiu fine donacis al la mondo la genian ilon...

„Ex Białystok lux“! La sentema knabo meze de siaj gimnaziaj studoj, sekvante la gepatrojn, devis transloĝiĝi Varsovion kaj tie Białystoka semo ekĝermis. Inter Białystok kaj la pola ĉefurbo juste dividiĝis la gloro. Ambaŭ urboj fariĝis Mekko kaj Medino de la Esperantistaro kaj iam certe ankaŭ de la tuta progresema mondo.

Białystok estas urbo plena da simboloj. Zamenhof naskiĝis en domo ĉe strato, kiu tiam — atentu kaj miru! — nomiĝis „Verda“. Nun kompreneble la strato nomiĝas „Zamenhofa“. Sed la pramalnova nomo de la strato, uzata de la popolo, estis „Buĉista“ (pole: „Jatkowa“). Ĉu do ne estas



La domo, kie naskiĝis D-ro L. L. Zamenhof.

Fot. J. Sapiro.

simbola tiu kronologia ordo de la nomo por la strato: Iam buĉista, diranta al ĉiu pri sango kaj mortigo, poste verda, signanta la espron pri pli bona estonteco, kaj fine — Zamenhofa...

Belegan simbolon prezentas ankaŭ la blazono de Białystok: ĝi konsistas el du ŝtataj blazonoj: Blanka Aglo — la blazono de Polujo, kaj Rajdanto — la blazono de Litovujo. Ĉu tiu urba blazono ne parolas al la ŝtatoj pri paca kunvivado? Du ŝtatblazonoj pace kunestas en unu urbblazono.

Białystok ne estas mondurbo, kvankam mondkonata. Ĝi havas nur 100.000 loĝantojn. Kaj tamen ĝi estas fortege ligita kun la tuta mondo. Ĝia industrio, precipe la teksindustrio, estas tiom entreprenema kaj vigla, ke białystokaj drapoj estas eksportataj en ĉiujn, eĉ plej malproksimajn lokojn de la tera globo. En Hindujo, Hinujo, Japanujo, Sirio, Afriko, sur la insuloj Kanariaj, en Sumatro kaj Nova Zelando — ĉie białystokaj drapoj estas konataj kaj ŝatataj. Białystokaj industriistoj havas direktan kontakton kun ĉiuj terpartoj. Iliaj produktaĵoj iras ĉien, sur la pakajoj estas surskriboj en ĉiuj lingvoj, eĉ la plej ekzotikaj. Vera Babela turo denove stariĝas en la oficejoj de białystokaj fabrikoj, kie amasiĝas la multlingvaj surskriboj kaj presajoj. Ankoraŭ unu simbolo: en la Zamenhofa urbo — multlingveco akriĝita, potencigita ĝis ekstremaĵoj limoj.


La nunjara JUBILEA KONGRESO DE ESPERANTO en Varsovio prezentas denove la eblecon al la Esperantistoj viziti tiun vere intereseĝan por ĉiu Zamenhofadepto urbo. Jam dufoje la Esperantistoj multnombre are vizitis ĝin. Unuafoje en 1927 post la Universala Kongreso en Danzig, kiam en Białystok okazis la solenaĵo de malkovro de la memortabulo, oferita de la urbestro, sur la nasokodomo de la Majstro. Duan fojon en 1931 post la Universala Kongreso en Krakovo, kiam okazis la neforgesebla solenaĵo de la meto de fundamento por Zamenhofa Monumento.

Nun la trian fojon Bialystok gastigos la verd-stelanojn. Pro nesufiĉa ĝisnuna rezulto de la mon-kolektado (post pago de la kostoj de la fundamen-to restas nun en la kaso nur ĉ. 3.500 zl.) nunjare ankoraŭ ne povos esti starigita la monumento. Sed neniun Esperantisto, veninta Bialystokon, bedaŭros sian viziton. Li spiras la aeron, kiun spiris la mal-granda knabo Ludoviko Zamenhof, li rigardos kun korporemo la malgrandan korton, kiu ĉirkaŭas la naskodomon de la Majstro, li vidos la etajn ĉam-bretojn de la loĝejo de Zamenhofaj gepatroj. Nur vidinte tion, li komprenos la geniecon de Zamen-hofa spirito. De tiu spirito, por kiu la mondo ne enfermigis en la malvastaj muroj de la gepatra loĝejo, nek en la malgranda, malpura korto. Kvan-kam de la fenestro de la malalta domo oni vidas nur etan pecon de pli alta domo kontraŭstaranta, kov-ranta ĉiun pluan elrigardon, malgranda Ludoviko vidis tra ĝi la tutan mondon...

Venu do ĉiu Esperantisto al tiu pilgrimloko por vidi ĝin, ekmediti pri la grandeco de Zamen-hofa genio, kaj por sperti miraklon, la miraklon

de ekkompreno plena kaj senresta de la SPIRITA TESTAMENTO, POSTLASITA DE LA MAJ-STRO AL NI, LIAJ DISĈIPLOJ.

Jakób Šapiro.



Marmora memortabulo sur naskodomo de la Majstro
Fot. J. Sapiro

PRI LA PROGRAMO KAJ KARAKTERO DE NIA JUBILEA

LKK de la „Jubilea“ dezirante ekscii opiniojn de samideanoj pri la aranĝoj kaj karaktero de la Kongreso dissendis specialan enketon. Bedaŭrinde, respondis nur 45 samideanoj el 1500! Tamen, la respondoj estas interesaj kaj instruaj. Preskaŭ ĉiuj respondintoj substrekas, ke la Kongreso ne havu turistan karakteron, sed esperantan. Multaj esprimas deziron, ke oni ne okupiĝu pri la organiza demando, kiu estu fine solvota per la ambaŭflanka paciĝo... Multajn aliajn sugestojn kaj proponojn enhavas la respondaro, ofte valorajn, ofte nereali-geblajn, sed ĉiujn pristudas kaj pritaksas la LKK.

Kia, estos do vera programo kaj karaktero de nia Universala Kongreso en Varsovio? Antaŭ ĉio Esperanta. Interesaj ekskursoj tra Polujo okazos, ja, post la Kongreso. Dum la Kongreso oni dediĉos multan tempon al Zamenhof kaj Lia verko: 1) Solenaĵo sur la tombo de Zamenhof, 2) Sole-naĵo sur la tombo de Lia disĉiplo A. Grabowski, 3) Festo de Veteranoj, 4) Enmurigo de memortabulo en la domon kie mortis Zamenhof, 5) Ekskurso al Bialistoko (urbo eble ne interesa laŭ la turista vidpunkto, sed kara al ĉiu esperantisto), 6) Jubilea Ekspozicio, 7) Esperantaj memorfilmoj.

Multaj esperantistoj plendas, ke por Labor-kunsidoj oni dediĉas ne tro da loko. Nun okazos 3 Laborkunsidoj. Bedaŭrinde, pro la situacio en la Movado okazos aparte kunsidoj de IEL kaj UEA. Tial tute apartan karakteron havos la Ferma Kunsido, al kiu oni dediĉis la tutan tagon. Dum ĝi niaj Centraj Organizaĵoj, Fakaj Kunsidoj kaj Konferencoj prezentos siajn raportojn, decidojn, proponojn. Ankaŭ apartaj kongresanoj proponos diversajn rezoluciojn, sugestojn (sen ektuŝo de la organiza problemoj!). Kaj kiel estis anoncote en cirkuleroj de LKK la devizo de la Kongreso

estas: Esperanto en la lernejojn! Sekve laboraj kunsidoj de la fakaj organizaĵoj, speciale TAGE, kaj fine la ĝenerala Ferma Kunsido diskutos la demandon de enkonduko de Esperanto en la lernejojn kaj de la relativa Interŝtata Akordo. Do, la Kunsido estos esence labora kunsido.

„Somera Universitato“ sonas tro pompe kaj ofte la prelegoj ne estis konformaj al ĝi. Tial oni decidis okazigi diversajn interesajn prelegojn, ofte kun lumbildoj, ne uzante la titolon „Somera Universitato“. Detaloj pri ili troviĝos en la kongresa libro aŭ en apartaj komunikoj.

Komprenoble, ke estos, ankaŭ, multaj distraĵoj: 1) Teatro dum kiu estos ludata komediaĵo de A. Fredro „Consilium Facultatis“ (trad. A. Grabowski), baletoj kaj koncerto, 2) Esperanta Kabaredo, 3) Internacia Balo, 4) Literatura Vespero, 5) Gvidado tra la urbo, vizito al muzeoj, ekskursoj. Verŝajne estos akcepto ĉe la Urbestro kaj aliaj aranĝoj. Komprenoble, ke ĉio estos anoncota ĝustatempe.

LKK klopodas, ke la Kongreso estu vere interesa kaj varia. De Via partopreno dependas la sukceso. Tial aliĝu tuj kaj multenombre partoprenu la Jubilean Kongreson en Varsovion.

Id.

*

En ĉi numero Vi trovos provizoran programon de la Jubilea, kiun LKK submetas samtempe al Centraj Organizaĵoj kaj Internacia Porkongresa Komitato por fina akcepto. El ĝi vi certe vidos, ke LKK penas doni al la Jubilea kiel eble plej imponan karakteron kaj kontentigi ĉies dezirojn laŭpove. Dependas jam nun nur de vi, Estimataj Samideanoj, ke Jubilea sukcesu tiel, kiel indas por nia granda Movado.

PROGRAMO DE LA KONGRESO

Sabato, 7.8.37
15 Kunsido de Internacia Pokongresa Komitato kaj LKK

19 Interkonatiga vespero (en ĝardeno). Muziko, Dancoj.

Dimanco, 8.8.37

9 Diservoj.

12 Solena Malfermo (Jubilea parolado de prof. Bujwid).

17 Malfermo de la XIV Kongreso de Blindaj Esperantistoj.

19 Malfermo de la Jubilea Ekspozicio.

20, 30 Festo de Veteranoj.

Lundo, 9.5.37

10 Ĉe la tomboj de l'Majstro kaj Grabowski

16 Laborkunsidoj de I. E. L. kaj U. E. A.

20 Teatro: 1) „Consilium Fakultatis“, unuakta komediaĵo de Aleksandro Fredro (tradukis A. Grabowski).

2) Pola muziko—danco—kanto.

Mardo, 10.8.37

Fakaj kunsidoj kaj konferencoj:

9, 30 TEKA, TAGE — (unua kunsido).

12 Katolikoj; Bahaa-anoj.

16 Laborkunsidoj.

20 Literatura Vespero.

Merkredo, 11.8.37

Pilgrimo al Bialystok.

Ĵaŭdo, 12.8.37

Fakaj konferencoj kaj kunsidoj:

9, 30 Lingva Komitato.

10, 30 Unuigo de Esperantaj Virinoj.

12 Kristana Esperanta Ligo, — Profesiaj Ĵurnalistoj.

16 Internacia Scienca Asocio Esperanta, — Kooperativistoj.

20 Kabaredo.

Vendredo, 13.8.37

Fakaj konferencoj kaj kunsidoj:

10 TEKA: popularaj prelegoj.

12 TAGE (dua kunsido).

16 Laborkunsidoj.

21 Internacia Balo.

Sabato, 14.8.37

10 Ferma Kunsido.

20 Adiaŭta Vepero en Varsovio.

Dimanĉo, 15.8.37

Libervola tago en Varsovio. Ekskursoj.

Rimarkoj: La Organizantoj de aliaj Fakaj Kunsidoj, ne menciitaj en la supra programo, bonvolu tuj anonci Vin por ke ni povu prepari lokon kaj rezervi tempon en la programo.

Ĉiutage okazos grupaj vizitadoj de la urbo, ŝipaj promenadoj sur Vistulo, ekskursoj al belega reĝa rezidejo „Wilanów“ ktp.

En la Kongresejo funkcios kino, kiu prezentos esper. filmojn.

Dum la Kongresa Semajno okazos interesaj prelegoj pri Polujo kaj pri aliaj temoj (kun lum-bildoj).

PROGRAMO DE TEKA-KONFERENCO

Dum la Kunsido de TEKA — Komisiono en Varsovio, okazinta la 2-an de Junio (ĉeestis Droj A. kaj M. Zamenhof, dro Kacprzak, Dro Knappe, Droj J. kaj I. Krenicki, Dro Reichert kaj Dro W. Róbin) estis starigita la programo de la TEKA — Konferenco, okazonta la 10 — an de aŭgusto je la 10 matene en la Salono de „Regna Instituto de Higieno“.

Malfermos la Konferencon la Prezidanto de TEKA. Estos elektita Honora Prezidantaro. Salutos la Kunvenon Rerezentantoj de la Registaro, de Medicinaj Societoj, de Redakcioj de medicinaj ĵurnaloj alilandaj kaj polaj, — fine Delegitoj de TEKA.

Sekvos sciencaj referaĵoj: de Prof. Dro LUBIENIECKI — Poznań, de Dro JUSTESEN — Danujo, de Dro THURSZ — Varsovio kaj de Prof.

Dro HIDEO YAGI — Japanujo. Diskutado pri tuŝitaj demandoj.

Fine oni prezentos deziresprimojn, kiuj en la nomo de TEKA — Konferenco estos transdonitaj al Estraroj de Internaciaj Medicinaj Kongresoj, al Redakcioj de medicinaj ĵurnaloj ktp.

La ĉeestontoj vizitos la grandan kaj tre interesan Regnan Instituton de Higieno kaj kune tagmanĝos.

Jen la provizora programo, en kiu eble okazos ne gravaj ŝanĝoj. De la multnombreco de kuracistaro dependas nun, ĉu la Konferenco sukcesos kaj farigos fruktoporta manifestacio. Estas kore invitataj Dentkuracistoj, Farmaciistoj kaj Samideanoj, apartenantaj al la ISAE (Int. Scienca Asocio Esperantista).

Dro W. Róbin.

EL LA KONGRESA URBO

En restoracioj,

kafejoj, magazenoj — postulu esperante parolantajn kelnerojn aŭ vendistojn, eventuale m e n u o n en Esperanto. Helpu al ni propagandi. Montru ke Esperanto estas efektive lingvo internacie parolata.

Oni manĝas

en Polujo diverstempe. Plej kutime estas: matenmanĝo inter 8—9; tagmanĝo inter la 14—15; vespermanĝo inter 19—20. Cetere en subita akcidento de grava malsato, Vi povas ion aĉeti ĉu en kongreseja bufedo, ĉu en iu ajn baro, aŭtomata bufedo aŭ

kafejo. — Precipe ni rekomendas bonegajn varsoviajn kukojn, kiuj kostas ĉie po 20 groŝoj. Se estos al Vi varmege, prenu glaciaĵojn, en iu el glaciaĵejoj, kiuj estas dislokitaj en la tuta urbo.

Oni fermas ĉiujn domajn pordegojn

je la 23. Do se Vi revenos post tiu horo, kaj Vi loĝos private, Vi devos premi la sonorilan butonon ĉe la pordego. La pordisto malfermos, kaj Vi bonvolu doni al li 10—20 grosojn, depende de Via bona volo kaj de Via „malfruigo“. Kompreneble tio ne koncernas samideanojn, kiuj loĝos en hoteloj aŭ en komunaj loĝejoj.

Se Vi deziras diboĉeti,

Vi facile trovos ĉiuspecajn decajn ejojn por tiu celo. De modestaj ĝis plej luksaj. Ankaŭ ekzistas dancejoj, kiuj funkcias nur nokte. Samideano: kanto, vino kaj knabino... Vi komprenas min. — Adresojn serĉu inter la anoncoj en la kongresa libro.


300 policistoj

partoprenas kursojn de Morariu. Pruvu al ili, ke ne vane ili lernis. Alparolu ilin nur Esperante. Kaj ne nur ilin: ĉiujn policistojn por logi ilin al nia

movado. Ankaŭ kun konduktoroj en tramveturoj kaj aŭtobusoj parolu nur Esperante.

Absolute portu insignojn!

Por montri nian multnombrecon ne forgesu alpingli la kongresan insignon. (daŭrigota).



Varsovio. Muzeo de Belartoj.

Fot. H. Poddebksi.

(El kolektoj de Pola Trafikministerio — Turisma Fako).

KOMUNIKOJ DE LKK

NOVA ADRESO DE LKK.

LKK havas nun novan belan ejon, kie estos ankaŭ akceptejoj. Nova adreso de LKK estas, Warszawa, I, Al. Jerozolimskie 39/11, telef. 8-87-42. Pola poŝtĉekkonto: 29 Universala Jubilea Kongreso de Esperanto, Warszawa, Nr. 23.445 kaj Societé Generale des Banques en Pologne.

KARAVANOJ.

Liston de la karavanoj bonvolu legi en „La Jubilea“ n-roj 1 kaj 2. Pro la 50% fervoja rabato sur polaj fervojoj por karavanoj ĉiuj karavanestroj estas petataj pripensi eblecojn aliĝi al aliaj karavanoj por komune profiti de la fervoja rabato sur pola teritorio.

FERVOJA RABATO.

Ĉiu kongresano ricevos sur polaj fervojoj 33% (resp. 50%) rabaton tien kaj reen. Ni klopodas pligrandigi la individuan rabaton sur la fervojoj. Belga Fervoja Direkcio donos 35% rabaton sur belgaj fervojoj kontraŭ speciala legitimilo, eldona de D-ro P. Kempeneers, 19 avenue Montjoie, Bruxelles. (Por la legitimilo aldonu 2 respondkuponojn). La legitimilo validos de la 15 de julio ĝis 31 de aŭgusto. Ankaŭ sur belgaj ŝipoj (de Anglujo ĝis Belgujo) estos 30% rabato.

LOĜEJOJ.

Ni sukcesis ricevi tre malkarajn loĝejojn. Tial aliĝu tuj.

PRELEGOJ.

Samideanoj povantaj prelegi dum la Kongreso estas petataj anonci sin al LKK. Skribu temojn, ĉu kun lumbildoj aŭ sen.

GLUMARKOJ.

Por 2 respondkuponoj ni sendas 50 kongresajn glumarkojn. Uzu la kongresan glumarkon sur ĉiu Via korespondajo.

TURISMA SERVO.

Turisman Servon de la Kongreso prizorgas Societo Turisma de Esperantistoj en Polujo kunlaborante kun pola vojaĝoficejo „Orbis“. Baldaŭ aperos speciala komuniko, kiu estos dissendata al ĉiuj vojaĝoficejoj, kongresanoj kaj aliaj samideanoj. Komuniko enhavos detalojn pri: 1) fervoja rabato, 2) vizitoj, 3) hoteloj loĝejoj k. t. p.

Vizitado de la urbo. Ĉiutage estos organizitaj grupaj promenadoj tra la urbo kaj vizitado de interesaj lokoj. Okazos ankaŭ ekskursoj al ĉirkaŭaĵoj de Varsovio per tramoj, aŭtobusoj kaj ŝipoj.

Postkongresaj ekskursoj. Post la Kongreso okazos ekskursoj al la plej interesaj urboj de Polujo (Krakovo, Poznań, Gdynia, Vilno); post la vizitado de la urboj ekskursanoj veturos al proksimaj pitoreskaj somerrestadejoj (Zakopane, Hel, Druskieniki). Ĉiu povas elekti lokon laŭ sia plaĉo. La tutan sudan parton de Polujo okupas granda montaro kun la plej famaj ĉeflokoj Zakopane kaj Krynica, konataj ne nur kiel vintraj sport — kaj ripozlokoj, sed ankaŭ kiel someraj restadejoj. En la nordo estas Balta Maro, ĉe kiu troviĝas la plej moderna haveno Gdynia, urbego mirakle konstruita dum dek jaroj. En la ĉirkaŭaĵoj de Gdynia estas multaj belaj banlokoj. Oriente en

Polujo troviĝas virgaj arbaregoj kaj lagoj.

En ĉiuj aferoj kunligitaj kun vizito de Polujo kaj partopreno en la Universala Kongreso Vi povas Vin turni al filioj kaj reprezentantoj de pola vojaĝoficejo „Orbis“.

MONAFEROJ.

En Polujo ekzistas mona limigleĝo. Tial en-vojaĝante en Polujon oni devas ĉe la pola limo registri la posedatan sumon por eviti eventualajn malfacilaĵojn forveturonte el la lando.

EKSTERLANDAJ FILIOJ KAJ AGENTEJOJ DE „ORBIS“

Amsterdam, 21/I, Leidschestraat, Poolsch Reis-Inlichtingen-Bureau „Orbis“. Nederlando.

Anvers, 44, Avenue de Keyser, Voyages Emile Wirtz Représentation „Orbis“. Belgujo.

Bruxelles, 50, Rue des Colonies, Bureau de Voyages „Orbis“. Belgujo.

Liège, 34, Rue des Dominicains, Agence de Voyages „Orbis“. Belgujo.

Paris IXe, 5, Rue de la Chaussée d'Antin, Bureau de Voyages „Orbis“. Francujo.

Paris XVIIe, 71, Avenue de Villiers, Bureau de Voyages „Orbis“ Section d'Emigration. Francujo.

Lille, 30, Rue Faidherbe, Bureau de Voyages „Orbis“. Francujo.

Strasbourg, 6, Quai de Paris, Bureau de Voyages „Orbis“. Francujo.

Berlin NW. 1, 143/149, Friedrichstrasse, Polnisches Reisebüro „Orbis“. Germanujo.

Beuthen O. S., 4, Tarnowitzerstrasse, Reisebüro „Polbis“. Germanujo.

Bucuresti, 2, Strada Clémenceau, Lignes Aériennes „Lot“ Représentation Orbis. Rumanujo.

Budapest V, 2, Vigado ter, Bureau de Voyages „Ibusz“ Représentation Orbis. Hungarujo.

London SW. 1, 25, Cockspur Street, Polish Travel Office „Orbis“. Anglujo.

New York, 38, Pearl Street, „Orbis“ Polish Travel Bureau-Inc. Usono.

Praha I, Na Prikope 13, Bureau de Voyages „Cedok“ Représentation Orbis. Ĉeĥoslovakujo.

Riga, 23/25, Smiĵu iela, Polu Celojumu Bi-rojs Del. P. B. P. Orbis. Latvujo.

Tel-Aviv, Montefiore 32 P. O. B. 3032, Bureau de Voyages „Orbis“. Palestino.

Wien I, 41, Kärtnerstrasse, Reisebüro „Orbis“. Austrujo.

American Express Company London SW. 1, Haymarket 25. Anglujo.

American Express Company Paris IXe, 11 Rue Scribe. Francujo.

A/S. Eesti Reisibüroo Tallinn, Kinga t. 3. — Postfach 78. Estonio.

„Intourist“ Moskvo por koresp. Pl. Swerdlo-wa 4, Moskvo por vojaĝ. Gorkowa 11 — Hotel National. U. S. S. R.

„Olympos“ Office de Tourisme et de Voyages Athenes, 1 Place de la Constitution. Grekujo.

Amerop Travel Service Berlin W. 9, Leipziger Platz. Germanujo.

„Celtrans“ Reise — und Transportbüro der Lettischen Staatsbahnen Riga, Aspazijas bulv. 4. Latvujo.

Central European Express Company Paris IXe, Rue Godot de Mauroy, 1. Francujo.

Exprinter Société Anonyme Paris Ier, Avenue de l'Opéra 26. Francujo.

Hermes Travel Office Athènes, 4, Rue du Stade. Grekujo.

International Travel Office Athènes, 10, Rue du Stade. Grekujo.

Japanese Government Railways Tokio. Japanujo.

Reisebüro Knyper, van Dam, Smeer Rotterdam, van Vollenhovenstraat 25. Nederlando.

„Mitropa“ Mitteleuropäische Schlafwagen— u. Speisewagen — A. G. Amsterdam, Leidsche-stratt 106—108. Nederlando.

„Mitropa“ Mitteleuropäische Schlafwagen — u. Speisewagen — A. G. Berlin NW. 7, Universitätsstrasse 2—3. Germanujo.

William H. Müller London EC. 3, Lower Thames Street. Anglujo.

Pro manko de la loko ni devas prokrasti presigon de la nomoj de kongresanoj. Ĝis nun aliĝis pli ol 500 samideanoj el 26 landoj.

AEROPLANE, PIEDE AŬ PER VAGONAR- VARSOVION ALVENU EN ĈI TIU JAR!

„La Jubilea“ estas senpaga por ĉiu Kongresano! Abonpago por 8 numeroj estas 3 zł. 50 gr.

Poŝtekkonto: Warszawa, P. K. O. 23445. Adreso: Chmielna 26/8.

Wydawca: Komitet Organizacyjny 29 Jubileuszowego Kongresu Esperantystów.

Redaktor odpow.: Aleksander Hartman.

Drukarnia „SIŁA“, Warszawa, Marszałkowska 71, tel. 8-34-48.